WIKIPEDIA

Serba lingvo

Serba (Turingio) estas komunumo de la distrikto Saale-Holzland en la federacia lando Turingio de Germanio.

La **serba lingvo** (serbe: *Srpski*) kodo laŭ ISO 639: scc/srp, sr) estas normigita versio de la serbokroata dialektaro. Ĝi estas oficiala lingvo en Serbio kaj Montenegro kaj en Bosnio kaj Hercegovino. Normale ĝi estas skribata per cirila alfabeto kaj latina alfabeto.

Serba	
Srpski	
Parolata en	Serbio, Montenegro, Bosnio kaj Hercegovino, Kroatio k.a.
Parolantoj	9 000 000
Denaskaj parolantoj	ĉ. 17 milionoj
Skribo	Cirila alfabeto, Latina alfabeto
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Slava lingvaro	
Suda slava lingvaro	
Serba lingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Serbio kaj Montenegro, Bosnio kaj Hercegovino (regione)
Reguligita de	Komitato por Normigo de Serba Lingvo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	sr
ISO 639-2	
Bibliografia	scc
Terminologia	srp
ISO 639-3	srp
SIL	SRC
Glottolog	serb1264
Angla nomo	Serbian
Franca nomo	serbe
Vikipedio	

Enhavo

Parencaj lingvoj

Variaĵoj de la serba lingvo

Cirilaj kaj latinaj literoj en la serba skribo

Aliaĵoj

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Parencaj lingvoj

La serba lingvo tre parencas al la kroata kaj bosna lingvoj. La parenco al la ceteraj slavaj lingvoj estas malpli granda.

La plej parto de serboj parolas la serban lingvon, membro de la familio de la sudaj slavaj lingvoj. Krom la fakto, ke la serba identeco estas pli malpli ligita al la serba lingvo mem, se oni kromigas la fakton, ke de la serboj estas uzataj alterne ambaŭ kaj la cirila alfabeto kaj la latina alfabeto, la serba estas tre simila al la kroata kaj multaj fakuloj (ĉefe antaŭ la disigo de Jugoslavio) konsideris ambaŭ kiel du variantoj de komuna lingvo serbo-kroata.

Variaĵoj de la serba lingvo

La serba lingvo ekzistas en du iom malsame prononcataj variaĵoj.

- Orienta serba: ekava prononco precipe en Serbio

- Okcidenta serba: ijekava prononco precipe en Montenegro, Bosnio kaj Hercegovino kaj Kroatio.

Ekzistas kelkaj variantoj de la serba; la plej komune parolata en Serbio estas la varianto ekava. La varianto iekava, parolata de la serboj de Montenegro, de Bosnio-Hercegovino kaj de Kroatio, diferenciĝas nur pro la prononco de kelkaj vokaloj (ekzemple *lakto* oni diras *mleko* en serba ekava kaj *mlijeko* en serba iekava). Krome ekzistas kelkaj regionaj diferencoj ĉe la nivelo de la prononco kaj de la uzo de kelkaj vortoj. La plej antikvaj formoj de serba estas la malnova serba kaj la ruso-serba, versio de la slavona lingvo, la liturgia lingvo de la slavaj ortodoksaj eklezioj. En Kosovo kelkloke praktikatas la oravaĉka dialekto.

Cirilaj kaj latinaj literoj en la serba skribo

А	**а**	**Б**	**б**	**В**	**в**	**Г**	**г**	**Д**	**д**	**Ђ**	**ђ**	**Е**	**е**	**Ж**	**ж**	**З**	**з**	**И**	**и**	**Ј**	**ј**	**К**	**к**	**Л**	**л**	**Љ**	**љ**	**М**	**м**
A	a	B	b	V	v	G	g	D	d	Đ	đ	E	e	Ž	ž	Z	z	I	i	J	j	K	k	L	l	Lj	lj	M	m

Н	**н**	**Њ**	**њ**	**О**	**о**	**П**	**п**	**Р**	**р**	**С**	**с**	**Т**	**т**	**Ћ**	**ћ**	**У**	**у**	**Ф**	**ф**	**Х**	**х**	**Ц**	**ц**	**Ч**	**ч**	**Џ**	**џ**	**Ш**	**ш**
N	n	Nj	Nj	O	o	P	p	R	r	S	s	T	t	Ć	ć	U	u	F	f	H	h	C	c	Č	č	Dž	dž	Š	š

Aliaĵoj

Kelkaj membroj de la serba diasporo ne parolas la lingvon, sed pluestas konsiderataj kiel serboj laŭ la origino.

Inter la neserboj kiuj studis la serban, oni trovas elstarajn gravulojn kiel Johann Wolfgang von Goethe aŭ J. R. R. Tolkien.

Vidu ankaŭ

- Cirila alfabeto
- Azbukum
- La serblingva teatro en Hungario



Eksteraj ligiloj

- http://www.rastko.org.yu/isk/pivic-standard_language.html
- http://www.slavicnet.com
- http://www.krstarica.com/dictionary
- Retejo de serblingva lernejo (http://www.srpskijezik.edu.rs)

Slava lingvaro		
Okcidentslavaj	ĉeĥo-slovakaj (ĉeĥa lingvo • slovaka lingvo • knaana lingvo) • soraba lingvo (suprasoraba lingvo • malsuprasoraba lingvo) • leĥaj lingvoj (pola lingvo • pomoria lingvo (kaŝuba lingvo • slovinca lingvo) • polaba lingvo)	
Sudslavaj	okcidentaj sudslavaj lingvoj (kroata lingvo • bosna lingvo • montenegra lingvo • slovena lingvo • serba lingvo • serbokroata lingvo) • orientaj sudslavaj lingvoj (makedona lingvo • bulgara lingvo • malnovslava lingvo) ...	
Orientslavaj	belorusa lingvo • ukraina lingvo • rutena lingvo† • rusina lingvo • rusa lingvo • Malnova Novgoroda dialekto†	

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Serba_lingvo&oldid=6773110"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 13:19, 30 okt. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.